

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 528

OKTOBRO 1949

NUN PRETA

SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko	-	-	-	-	-	-	<i>Rektoro Karl Söderberg, Svedujo</i>
La laponoj kiel kultura popolo	-	-	-	-	-	-	<i>Profesoro B. Collinder</i>
La kimraj artofestoj	-	-	-	-	-	-	<i>R' Rossetti</i>
El la mirinda naturo	-	-	-	-	-	-	<i>C. Støp-Bowitz</i>
Astronomiaj sensacioj	-	-	-	-	-	-	<i>Profesoro K. Lundmark</i>
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	-	-	-	-	-	-	<i>Profesoro D-ro Ivo Lapenna</i>
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	-	-	-	-	-	<i>D-ro P. Neergaard</i>
La kalevala kulturo	-	-	-	-	-	-	<i>Vilho Setälä</i>
Pri la sveda kooperativa movado	-	-	-	-	-	-	<i>Rektoro S. A. Stahre</i>
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	-	-	-	-	-	-	<i>F. Szilagyi</i>

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.

(17 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Libro por korespondemuloj senpage ! Kaŭze de novaj eldonkriterioj aperos en 1950.

Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista, 1950. Kvina jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, korespond-deziroj—du internaciajn respondkuponon (kun senpaga ekzemplero). Limdato : 15 Decembro. Aperos : Januaro 1950. Lorcán OhUiginn, Bothar Glasárd 16, Dublin, Irlando. 1949a eldono ankoraŭ havebla.

Vladimir Bašta, Praha II, Kremencová 21, Ĉeĥoslovakujo deziras korespondadi per leteroj aŭ ilustritaj kartoj kun gesamideanoj el la tuta mondo.

W. G. Tozer, 19 Dartmoor Quarters, Bordon, Hants., Anglujo, armilfarista ĉefserĝento, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj distriktoj de Esperantujo.

Kok(in)breĉistojn studanto praktika deziras kontakti, precipe pri la angla vario "Light Sussex". Skribu al J. Doyelle, 27 Rue de Dunkerque, Bourbourg (Nord), Francujo, aŭ al J. Farmer, apotekisto, Ryde, I.o.W., Anglujo.

Pri dentistaj aferoj deziras korespondi kun la tuta mondo S-ro Ivan Mikš, dentisto, Osijek I, Anke Butorac 35, Jugoslavujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi tajlordesegnaĵojn kun la tuta mondo Dragutin Orlović, Sutjeska 9, Mitrovica Srem, Jugoslavujo.

Deknaŭjara Germana studento deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Heinz Klefing, Heiderstrasse 23, Recklinghausen S II, Germanujo.

Medicinstudentino serĉas samfakajn gekorespondantojn. Maria Plesinska, Czysa 10, Kraków, Pollando.

KARTA ENCIKLOPEDIO

Ĉiu temo—originala artikoleto kaj bildo(j)—okupos apartan grandformatan poŝtkarton. Ĝis nun aperis : la Ŝtoncirklo Stonehenge, antikvaj montflankaj bildegoj, razenaj labirintoj kaj mezepokaj gratitaj sunhorloĝoj (Britlando) ; Ogamaj ŝtonoj (Irlando) ; la lingvo de la perventaj turniloj (Nederlando) ; fostopreĝejoj kaj lignaj kalendaroj (Skandinavio). Ricevos tiujn ok kartojn ĉiu kiu sendas al "La Bosketo", Whiteway, Stroud (Glos.), Anglujo 4 rpk. en letero aŭ 8 bild(kart)ojn interesajn laŭ kulturhistoria vidpunkto (ekz. pri kampara domo, vilaĝa preĝejo, kapeleto aŭ kalvario, muelejo, kolombejo, abelujo, sunhorloĝo, *malnova ilo*, muzea antikvaĵo, k.s.) en nefermita koverto kun sia adreso.

PORTU LA STELON !

Tio estas simpla kaj efika propagando.

UEA-insignoj, broĉo aŭ butono,

po 1ŝ. 6p. aŭ 6 rpk. afrankite.

Tre belaj arĝentumitaj insignoj, broĉo aŭ butono.

po 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite.

Mendu ĉe U.E.A.

Fadenigatan ŝtalon, pikajan fadenon deziras eksporti ekster-Francujen : "Esperanta-Komerca-Servo", 98 rue Casimir-Delavigne, Le Havre, Francujo.

Letervesperon organizas regiona kongreskomitato. Sendu bildkartojn amase : Esperanto-Kongreso, 1 allée Pigny, Le Havre, Francujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn S-ro Jan Lehnert, Veseli nad Mor. 152, Ĉeĥoslovakujo.

Koro Esperanta, Brno, Ĉeĥoslovakujo, sendas kontraŭ mona aŭ aĵa valoro, ĝlumarkojn, poŝtkartojn, vestinsignojn.

Klubo Esperantista de Stockholm, Svedujo, aranĝos letervesperon komence de januaro 1950. Leteroj kaj poŝtkartoj el ĉiuj landoj kaj mondpartoj tre bonvenaj. Almenaŭ unufoja respondo garantiata. Adresu la poŝtaĵojn : Esperantoklubo, s-ro Hugo Andersson, Birger Jarlsgatan 60, Stockholm, Svedujo.

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,
S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.
Esperanto-Esperanta.

Nova prezo pro kurzo-ŝanĝo 28 ŝil. 6p., afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono.

Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARO Oktobro 1949

N-ro 528 (10)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

^ EĤOJ DE LA 34a KONGRESO

Konstatoj, kritikoj, konkludoj

Pasis la 34-a kongreso, la tria post la militfino. Utilas fari kelkajn konstatojn kaj tiri el ili la ĝustajn konkludojn. La tria kongreso post la unua milito okazis 1922 en Helsinki, epoko kiam la orienta najbaro de Finnlando honoris nian aferon per eldono de speciala poŝtmarko. Vera koincido estas, ke dum la tria kongreso post militfino la Aŭstra Poŝta Direkcio eldonis poŝtmarkon je honoro de nia lingvo.

Post la dua mondmilito nia plej urĝa tasko estis regroupigi niajn fortojn kaj doni al nia klopodado direkton, adaptitan al la cirkonstancoj. Ni trovis antaŭ ni detruitan ekonomion de la plimulto de landoj ĉefe interesantaj nin, detruitajn landojn kaj detruitajn iluziojn. La unua kongreso postmilita en Berno ankoraŭ ne povis esti direktodona al nia laborado. Ĝi estis kvazaŭ *esplora* pri la fortoj kaj rimedoj ekzistantaj. Ni ne malkonu la fakton, ke venis al Svislando multaj esperantistoj pro avido vidi landon ne tuŝitan de la milito, ian imagitan paradizon ! Malmö estis ŝtupo en la restarigo de la internacia laborado kaj Bournemouth jam estis salto sed ne plu nura paŝo. Grava konstato por malnova esperantisto estis la konatiĝo kun multaj novaj fortoj kaj pri la bona uzado de nia lingvo. Foliumante la kongreslibron, oni facile konstatas krome, ke la nombro de aferaj kunvenoj ĉiaspecaj estis pli ol en la du antaŭaj kongresoj. La laborkunvenoj estis, ni ripetu, tre bone vizitataj kaj la intereso sincera. Ĉu tio estis sekvo de la severeco de postmilita Britujo, ĉu sekvo de la konstantaj admonoj esti serioza, mi ne volas respondi. Ĉagrena estis la foresto de samideanoj el landoj orientaj, de kiuj venis nur tri-kvar delegitoj. Se la situacio estus normala, la nombro de la kongresanoj estus atinginta pli ol dumil. Ni kredas ne troigi, konkludante, ke laŭ esperantista kaj afera vidpunktoj, ni rajtas esti kontentaj. Pli oni vere ne povas atendi.

Kion ni kritiku ? Nu, se oni devas nepre ion trovi, oni trovas ankaŭ kritikindaĵojn. Unu el ili estis la tromulto de kunvenoj egale ĉu ĝeneralaj, ĉu alispecaj. Komitatano, ekzemple, kiu ne maltrafis kunvenon de komitato (kaj Estraro) nenion profitis de la kongreso mem. La afero kuŝas ne en la kunvenoj mem, sed en la laboroj ligitaj kun ili, raportado, informado k.s. Plej ofte la kompatinda komitatano kunlaboras en landa aŭ faka organizaĵo, kaj tio devigas lin oferi distraĵon, cetere ne tre multan en Bournemouth. S-ro Teo Jung en *Heroldo* atentigas pri ia manko de soleno kvankam laŭ lia opinio la kongreso estis digna entute. Prava opinio ! Samideano Reto Rossetti, preleginto en la S.U., kritikas la neĝuste lokitan aplaŭdon de la kongresanaro okaze de la (anglalingva) parolado de la urbestro. Tio povus supozigi, ke ĉiuj kongresanoj same bone posedas la anglan kiel Esperanton ! Kritikemulo, kiu nepre volus ion trovi, rimarkigus, ke Bournemouth avare mezuris la distraĵojn, ke la internacia balo jam frue finiĝis, ke ne estis eble multe amuziĝi.

Pri diversaj teknikaj detaloj plibonigindaj de la kongreso ni okaze parolos. Tiaj plibonigoj plej ofte dependas de homoj pretaj oferi sian tempon dum la kongreso por konstante esti pretaj servi al aliaj.

La ĝenerala konkludo estas, ke memorante kio okazis post la jaro 1939 kaj kion signifis tiu periodo por nia movado, ni ne rajtas atendi pli multon. La 34-a kongreso estis unuavice pruvo, ke Esperanto reprenis sian lokon en la internacia vivo, duavice grava paŝego antaŭen al konsolidiĝo de nia movado. La pozitiva fakto ja estas, ke en Bournemouth oni **laboris** kaj malmulte sin distris.

H.J.

Svedlando Internacia kurso

Pasintan printempon gazetoj atentigis la esperantistan mondon pri okazonta novspeca feriokurso. La (neesperantista) Laborista Kleriga Asocio, eminenta kulturorganizaĵo de Svedlando, invitis esperantistojn al dusemajna internacia kurso pri svedaj socia strukturo kaj socia politiko. La nomita organizaĵo komisiis al Sveda Esperanto-Instituto prizorgi la detalojn de la kurso, kiu povis akcepti maksimume 50 anojn. Per monhelpo de la diversaj svedaj organizaĵoj oni povis promesi al nesvedaj partoprenontoj senpagan restadon en Svedlando.

Kiam la kurso malfermiĝis 26-an de Junio ĉeestis samideanoj el ok landoj kaj el ili triono estis svedoj.

La kursloko estis granda, moderne ekipita popolaltlernejo, situanta en belega arbara regiono apud la rivero Viskan proksime de Gotenburgo. Kun permeso de la rektoro, granda verdstela flago ĉiutage flirtis super la lernejo.

La ĉefa celo de la kurso estis, doni al la kursanoj plejeble profundan scion pri sociaj cirkonstancoj en Svedlando (La temaron vidu en antaŭa avizo). Prelegantoj estis redaktoro Einar Adamson, instruisto Einar Dahl, parlamentano Ernst Eriksson, kulturhistoriisto Sam Owen Jansson, ĉefredaktoro Hilmer Johansson kaj la sekretario de Sveda Esperanto-Federacio Helmer Almén.

En liberaj horoj la kursanoj promenadis en arbaroj kaj baniĝis en proksimaj lagoj. Oni ne forgesis aŭskulti radio-elsendojn en Esperanto el Praha, Parizo, Berno, Varsovio kaj Budapest. La pli malpli seriozan kantadon akompanis la tirharmoniko de F-ino Inga-Maj Adamson.

Samideanoj el Borás kaj Gotenburgo kaj aliaj proksimaj urboj ofte vizitis la lernejon. Por la kursanaro estis aranĝita ekskurso al la bela urbo Borás, kies urbestro afable disponigis dum tuta tago komfortan aŭtobuson, per kiu fari rondveturon. En la granda moderna urba mal-

sanulejo la ĉefkuracisto D-ro Möller, gvidis nin tra la diversaj ejoj prelegante pri la sveda malsanulzorgo.

Post dekunutaga studado la kursanaro adiaŭis la popolaltlernejon por vojaĝi al Stockholm, kie sub gvido de sekretario Almén ili konatiĝis dum tri tagoj kun la urbo kaj estis unu tagon gastoj de la Sveda Koopera Federacio, kiu aranĝis vizitojn al diversaj kooperaj entreprenoj.

En adiaŭa festo la kursanoj unu post alia esprimis sian plenan kontenton pri la aranĝoj kaj la esperon, ke oni aranĝos similajn kursojn ĉiujare. La plenan sukceson de la kursoj oni ŝuldas al multe da sinofera laboro de la prelegintoj kaj precipe de la ĉefprizorgantoj, S-roj Gunnar Rosell, prezidanto de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio, kaj Ernfrid Malmgren, prezidanto de U.E.A.

Ludvig Anjer.

Pri la filmo DANLANDO

En antaŭ numero de *Esperanto* ni informis pri la eldono, flanke de la dana ministerio de eksteraj aferoj, de esperantlingva filmo *Danlando*, kiu montriĝis la unuan fojon en Malmö, kaj kiu estos disponigata senpage al interesataj esperanto-organizaĵoj.

Dum januaro la filmo akompanis S-ron J. Vesterland-Andersen tra Francujo dum prelegvojaĝo. Poste ĝi estis en Finnlando, kie S-ro Vilho Setälä aranĝis en Helsinko preskaŭ 40 prezentojn al pli ol 8000 lernejoj.

La intereso pri la filmo estas granda kaj mendoj venis el 20 landoj. Pro tio, kaj pro la jam bone akiritaj rezultoj, la dana ministerio jam eldonis 5 novajn ekzemplerojn de *Danlando* por ke mendintaj organizaĵoj ne tro longe atendu. Landaj organizaĵoj dezirantaj pruntepreni la filmon por disdono al lokaj grupoj kaj aliaj enlandaj organizaĵoj, bonvolu sin turni al Dana Esperantista Komun-Komitato, Bygtoften 8, Lyngby, Danlando. Nepre atentu: individuoj kaj lokaj grupoj turnu sin **nur al sia enlanda organizaĵo**, kaj ne senpere al Danlando.

Grava avizo al ĉiuj kontribuantoj

Konstatinte, ke tekstoj bonfide akceptitaj en niaj kolonoj surprize aperis ankaŭ en aliaj Esperantistaj gazetoj, ni decidis, ke de nun ni publikigos en nia gazeto nur la tekston, kies aŭtoro deklaris, ke li ne sendis la samon al aliaj gazetoj. Kompreneble tiu rigora regulo ne koncernas la komunikojn de la instancoj komunaj al ĉiuj Esperantistoj, ekzemple la Akademio; nek la informojn gravajn kaj urgajn, kiujn devas koni ĉiuj Esperantistoj senescepte.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstralio

Okazos 3-an ĝis 7-a de Januaro 1950 Aŭstralia Esperanto-Konferenco en Melbourne, ĉefurbo de ŝtato Victoria. En la kadro de la konferenco oni okazigos ĝeneralan kunvenon de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, fakkunsidojn de U.E.A. kaj S.A.T.-membroj, prelegojn kaj grandan ekspozicion por la ne-esperanta publiko. La tutmonda esperantistaro estas invitata sendi Esperantaĵojn por la ekspozicio kaj la plej interesan sendon oni premias per libro-premio. Pro la granda distanco oni petas tujan alsendon, ĉar ordinara letero bezonas 2 monatojn de Eŭropo al Aŭstralio. Oni sin turnu al: Aŭstralia Esperanto-Konferenco, Post Box 2122 T, Elizabeth Str., MELBOURNE, Vic., Aŭstralio.

Aŭstrujo

La Internacia Esperanto-Muzeo, fondita en 1928 en Vien kiel *aparta kolekto* en la kadro de la Aŭstra Nacia Biblioteko, denove funkcias en 4 salonegoj de Hofburg (iama imperiestra kastelo) en la centro de Vieno. De la periodo post 1938 preskaŭ ĉiuj periodaĵoj kaj eldonaĵoj mankas. La Muzeo afable invitas donacojn de ĉiaj materialoj, flugfolioj, gazetoj, libroj, cirkuleroj, afiŝoj, gvidiloj, fakte ĉio rilatanta al Esperanto aŭ aliaj mondhelplingvoj. Oni petas donacojn, eĉ modestajn, de mono por pagi oficiston, bindadon, afrankon, telefonon k.s. Oni precipe petas alsendon de kongresmaterialo (eĉ pri antaŭaj kongresoj) por kompletigi la mankojn. Oni povas fariĝi dumviva membro de la Muzeo kontraŭ 50 rpk. aŭ 12ŝil. 6p. pageblaj al U.E.A.

Int. Esp.-Muzeo, Hofburg, Batthyanystrasse, WIEN I, Aŭstrujo.

Brazilo

Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko organizis novan kurson de Esperanto, kiu funkcias en la aŭditorio de ĝia sidejo Avenida Franklin Roosevelt, 166, 10a etaĝo, Rio de Janeiro. La inaŭguro okazis en la 29-a de Aprilo kun ĉeesto de D-roj R. Xavier, ĝen. sekr. kaj V. Lopes, direktoro de la Sekretariejo. La fakestro de la Instituto, D-ro Mário Ritter Nunes, diris kelkajn trafajn vortojn pri la signifo de internacia lingvo por la statistikistoj. La Instituto dum pli ol dek jaroj uzas Esperanton por la korespondado eksterlanden.

En lando vastega kia Brazilo ne ĉiam regule kaj kontentige la grupoj povas interrilati kun la landa organizaĵo nek inter si. Pro tio la centra organizaĵo ne povas doni la necesan kaj tujan apogon, krom la morala, nek stimuli la fondon de novaj grupoj en malproksimaj regionoj. Pro tio oni decidis fondi en la ŝtato Sao Paulo S. Paulo

Esperanto-Federacio kun Prezidanto S-ro O. Leite de Moraes kaj Sekretario F-ino A. Guerrini. La nova organizaĵo prizorgos la pli lokan propagandon kaj organizadon sed intime rilatos kun la centra landa asocio, kiel ankaŭ kun aliaj landaj organizaĵoj.


* * *

Diversaj grupoj lastatempe organizis, kunlabore kun la Brazila Ligo Esperantista, ekspoziciojn, kiuj altiris multajn vizitantojn. Ili okazis en urboj Rio de Janeiro, Manaus, Natal, Joao Pessoa kaj Bauru. Dum la du lastaj oni uzis oficialan memorigan poŝtan stampon. Pluraj radiostacioj elsendas Esperantajn programojn. La grava Rádio Ministério da Educação e Saúde prezentis teatraĵon pri la vivo de Zamenhof bazitan sur la libro de la argentina verkisto A. López Luna *Zamenhof—Iniciatinto de Esperanto*.

Revista Brasileira de Geografia kaj *Revista de Sociedade Brasileira de Geografia* publikigas en Esperanto resumojn de artikoloj.

Honore al la memoro de la gvidinto de la movado en Brazilo, la Urbestro de Rio de Janeiro nomis novan straton *Couto Fernandes*.

Baldaŭ aperos riĉa broŝuro *Urbo Belo Horizonte*, kiu daŭrigos la serion pri brazilaj ĉefurboj.



La Organiza Komitato por la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Belo Horizonte, Minas Gerais, de la 21-a ĝis la 24-a de Sept. 1949. Sidantaj: F-ino Maria Lígia Agrícola Nogueira, 3-a sekretario; Supera Juĝisto D-ro Arnaldo Alencar de Araripe, Prezidanto; D-ro Ludoviko Azeredo Coutinho, Vicprezidanto; S-ro Allan Kardec Affonso Costa, 2-a sekretario.

Starantaj: (de maldekstre) S-ro Manuel Rodrigues de Carvalho, 1-a sekretario; S-ro Misael Alves Mendes, kasisto; D-ro José de Barros Monteiro, helpa kasisto.

Nov-Zelando

La 15-a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en Wellington, 31-an de Decembro ĝis 3-a de Januaro, 1950. Bonvolu sendi salut-leterojn al: S-ro N. Hill, 15 Eagle Street, Karori, WELLINGTON, Nov-Zelando.

Atentu ! Novzelando Filmstrio

En *Esperanto* Nov. 1948 kaj aliloke oni raportis, ke la novzelanda registaro senpage disdonos turisman filmstrion kun teksto en Esperanto, kaj belajn fotojn por represado en naciaj gazetoj.

La Wellington-a Klubo anoncas, ke la petoj alvenis tiel multnombro, ke la koncerna departemento ne povas trakti ilin ! La nombro estas proksimume mil kaj tute okupas unu oficiston ! Sekve la Turisma Departemento nun krias *Sufiĉe !* kaj petas, ke ni haltigu tiun lavangon de leteroj. Ĝi jam disdonis al diversaj delegitoj 144 filmstriojn. Ĉiu pëtinto ricevos leteron kun la adreso de la koncerna delegito. Preskaŭ troa sukceso ! Ni elkore dankas al ĉiu persono, kiu petis filmstrion aŭ fotojn kaj ni certigas, ke nia registaro lernis ion pri la praktika valoro de Esperanto.

Tamen **nepre ne forgesu la sekvon !** Nepre raportu pri uzo de la filmo kaj sendu ekzemplerojn de fotoj represitaj en naciaj gazetoj. Tio pli gravas ol la laŭdinda petado. Aliaj gazetoj bonvolu kopii.

Brendon Clark, Ĉefdelegito.

Pollando

En Junio okazis en Gdanska Ŝipfarejo ekzameno de Esperanto post kurso gvidita de S-ino Kaminska kaj kun financa apogo de la nomita enterpreno. Ĉeestis reprezentantoj de la estraro de la Ŝipfarejo kaj la prezidanto de la estraro S-ro Nakonieczny multe kontribuis al la afero. Tuj poste oni starigis novan sekcion en la kadro de la entrepreno, kun nomo Balta Stelo. La novaj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne havis kontaktojn kun la tutmondaj samideanoj, invitas tiajn personajn kontaktojn per leteroj k.s. La adreso estas Stocznia Gdanska, "Balta Stelo" Lisia Grobla Nr. 1, Swietlica, Gdansk, Pollando.

Komento pri la U.K.

La Redaktoro, "Esperanto"

Estimata Sinjoro,

Repensante pri la sukcesa Bournemouth'a Kongreso, mi memoras nur unu veran makulon en neforgesebla semajno. Tio estis la ĉagrene malalta nivelo de la surestradaj paroloj en la oficialaj kunsidoj kaj precipe en la Solena Malfermo, kie kelkaj paroloj apenaŭ estis kompreneblaj. Tio montras, ke antaŭ ol iri al Bournemouth la parolintoj ne sufiĉe ekzercis sin sur la oratora kampo. Ja necesas, miaopinie, ke tiuj samideanoj kaj precipe la novaj adeptoj, kiuj intencas oratori en niaj kongresoj estontece, praktiku la lingvon en la grupoj antaŭ ol kongreseniri. Fine, oni plej klare parolas Esperanton uzante la lipojn. Tro da Esperantistoj parolas en la gorĝo, eĉ en la stomako !

Tre sincere via,

Basil McGrath.

La nunaj vivkondiĉoj en okcidenta Germanujo

La situacio post la milito estis ĉe ni terura. Rubo kaj ruinoj ĉie. Regis senespera loĝejmizero kaj malsato, kaj mankis preskaŭ ĉio. Multe da mono cirkulis, sed neniam eblo aĉeti eĉ la plej gravajn nutraĵojn. Pri aliaj artikloj oni tute ne povis pensi. Senespera stato. Eĉ nun ni ne estas feliĉaj homoj, tamen la monreformo en Junio 1948 radikale ŝanĝis la staton de aferoj kaj plibonigis nian situacion. Mi parolas laŭ mia vidpunkto de simpla laboranta homo. La kamparanoj kaj la komercistoj de la nigra merkato ĉiam pli bone vivis kaj vivas. Nun la mono mankas kaj senlaboreco kreskas. Ĉiuj aĵoj, antaŭe neakireblaj, nun estas riceveblaj en la vendejoj. La baza salajro de nemetia laboristo pli ol 21-jara, fiksita laŭ kontrakto inter fabrikantoj kaj laboristaj unuigoj de Hannover kaj Braunschweig (en aliaj urboj tio iom varias) estas 53 markoj por 48-hora semajno. Jen kelkaj komparaj ciferoj surbaze de tiu normo :

Mezkvalita loĝejo kostas por semajno 25% ; nigra pano mezkvalita 2.75kg. kostas unuhoran salajron ; butero unuakvalita por ½kg. kostas 2½horojn ; terpomoj 8kg. kostas horon ; per unu horlaboro oni povas aĉeti 3 ovojn aŭ 3 litrojn da lakto aŭ 1kg da sukero ; ½kg. da margarino kostas horan laboron kaj simila laborsalajro estas necesa por 1½kg. da tritikfaruno. Tiu lasta tamen estas preskaŭ nehavebla ekster la "nigra". Fromaĝo (enlanda mezkvalita) kostas horsalajron por ¼kg. ; ½kg. da bovaĵo kostas 2 horan penadon ; simila kvanto da porkviando kostas 3 horojn ; ½kg. da kolbaso kostas 3 horojn ; ½kg. da mezkvalita marmelado kostas ¾ da horsalajro. Unuhora laboro aĉetas 27 pecojn da blankaj bulketoj, sed 11 horoj estas necesaj por ½kg. da malbona kafo ! Unuhora salajro aĉetas 11 cigaredojn aŭ 11 skatolojn da alumetoj, kaj por ricevi 50kg. da bonaj karboj oni devas labori 4 horojn. Mezkvalita biciklo kostas salajron por 3 semajnoj. Viraj ŝuoj kostas de ½ ĝis 1 semajnsalajron, vira vestaro 2 ĝis 6 semajnojn da laboro. Motociklo mezkvalita kostas 29 semajnojn ; aŭto (popola) 100 semajnojn.

Preskaŭ ĉiuj artikloj kaj nutraĵoj estas porciigitaj, sed multaj laboristoj ne povas aĉeti la porciaĵojn. Metiistoj kaj specialistoj gajnas ĝis duoblo de la salajro de laboristo.


Samspeca laboro estas pagata samkvante ĉu por viroj ĉu por virinoj.

En tia malfacila situacio ni iomete rekonstruas sed estas ege malfacile.

A. Schorcht.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***Faŭsto I** de Goethe, trad. N. Bartelmes. Eld. Siegfried Ziegler Verlag (Esperanto-fako), München-Pasing, Germanujo. Dua reviziita eldono.

18×11cm. 190 p. tole bindita. Prezo 18 ŝil.

La apero de dua eldono de Esperanta verko ĉiam estas salutinda okazo, kaj kiam temas pri mondkonata klasiko ni havas motivon ĝoji, ke la postulo pri tia serioza literaturo necesigis novan eldonon.

La Esperanta traduko de *Faŭsto* en 1923 vekis multan atenton ĉe literaturamantoj, kiuj—malgraŭ la majstra ekzemplo de *Ifigenio*—dubis pri la eblo taŭge redoni la profundan pensadon kaj animan konflikton de la granda geniulo, kaj samtempe konservi la belon de la poezia formo. La recenzistoj tiutempe konfirmis, ke Bartelmes grandparte sukcesis en tio. En la dua eldono li faris iom da revizio kaj la rezulto estas tre laŭdinda. Neniu povus pretendi, ke *Faŭsto* estas *viando por ĉiu*; la subtilaj aludoj, la komplikitaj kaj delikataj nuancoj de esprimo kaj la penetraj observoj pri la strebado de la homa spirito difinas ĝin nutraĵo nur por tiu ŝatema elito, kiu pretas paŝi la penigan vojon en la postsignoj de la krea artisto kun la espero kapti almenaŭ eĥon de lia altefluganta kanto. Ĉi tiu traduko ĝis alta grado kaptas la spiriton kaj la sencon de la multa kaj abstrakta filozofado de Goethe kaj krome donas al ni riĉan trezoron de poezio.

Mi kaptas la okazon saluti entreprenon novan—Siegfried Ziegler Eldonejo (Esperanto-fako)—kiu meritoplene daŭrigas la altan tradicion de longa serio de Esperantaj eldonistoj en Germanujo. Pri ĉi tiu unua volumo mi admiras la belajn bindon, paperon kaj presteknikon, kiuj faras ĝin estetike kontentiga vesto por la altnivela enhavo.

Mason Stuttard.

***Komentario al Faŭsto I** de Max Butin. Eld. Siegfried Ziegler Verlag. 18×11cm. 18 p. Broŝ. prezo: 2 ŝil. 3p.

Por la plena kompreno de *Faŭsto* ia komentario estas necesa, kaj ĉi tiu modesta verko de M. Butin kontentige gvidas la novicon tra la labirinto de aludo kaj cito en la verko de Goethe. Paŝon post paŝo li kondukas nin laŭ ĉiu fazo de la elvolviĝanta vivo de la geniulo kaj montras al ni la rilaton inter la travivaĵoj faktaj kaj la fantazioj artaj de Goethe. La lingvo estas escepte bona. Ŝajnas al mi sole kritikinda la fakto, ke ĉi tiu valora studo ne formas parton de la volumo *Faŭsto I* mem.

Mason Stuttard.

***Somera Universitato—Malmö 1948.** Eldonita por U.E.A. de The Esperanto Publishing Company. 18×11cm. 108 p. kart. prezo 4 ŝil. afranko 2p.

Enhavo: *Enkonduko*; *La laponoj kiel kultura popolo*; *La kimraj artfestoj*; *El la mirinda naturo*; *Astronomiaj sensacioj*; *Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro*; *El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj*; *La kalevala kulturo*; *Pri la sveda kooperativa movado*; *Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro*.

La jena grava kaj leginda verko prezentas la prelegojn faritajn por la somera universitato de la kongreso en Malmö 1948. Ĝi enhavas vulgareajn pritraktojn pri temoj de naturscienco, sociologio, literaturo kaj etnografio, de personoj eminentaj kaj, verŝajne, kompetentaj.

Arnold Bennett iam diris, ke ĉiu recenzisto havas la devon, verki kompetente, sed pli grave estas, ke li verku interese. Certe la kontribuantoj al ĉi tiu volumeto sciis verki interese. Nur pri tio mi kompetentas juĝi.

La kulturo de Esperanto estas grava afero. Mi memoras klare la laŭtan proklamon de oratoro Olŝvanger en la Edinburga kongreso de 1926: "Grava problemo de la esperantistaro, kiun oni ne volonte konfesas, estas ĝia malalta kultura nivelo." Se oni konsideras la amason da dubaj valoraj libretoj kaj gazetoj, aperintaj en la lastaj dudek jaroj, kaj la malmultan aĉeton por eĉ la plej valoraj verkoj, oni ne povas kredi la sentencon de Olŝvanger malaktuala.

Ankoraŭ oni ne povas atendi gravan originalan kulturon por Esperanto; iu Kalocsay aŭ Schwartz, iu sciencisto fakule verkanta rekte en la lingvo, tiuj izoluloj ne sufiĉas. Sed la kampo de vulgarega kulturo ege taŭgas por nia lingvo, kaj U.E.A. estas gratulinda pri ĉi aldono. Ni esperu, ke pri la antropologio ĝis zoologio sekvos similaj valoraj verkoj.

Prese, la jena verko estas taŭge prezentita; lingvo bone polurita, kaj nur kelkaj el la neologismoj ŝajnas superflujaj; Lapenna ŝokas, meze de p.45, skribante *ne direkte* anst. *ne rekte*.

Lasta komento. Ĉu saĝe estas, mikse prezenti aŭtorojn eminentajn ekster Esperanto kun aŭtoroj eminentaj nur en Esperanto?

K. R. C. Sturmer.

Ricevitaj: **Arsberetning** de Paul Neergaard. Ĉiujara raporto de la plantpatologia laboratorio de J. E. Ohlsens Enke, semistoj, Kopenhago. Danlingva teksto kun resumoj en angla kaj Esperanta lingvoj; prezo ne indikita.

Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakujo. Eldono de Instituto de Esperanto-servo en Praha. Sendota kontraŭ rpk. por afranko.

FAKAJ RAPORTOJ EN LA U.K.

Blinduloj

La blinduloj renkontis sin en Bournemouth por speciala Blindulafera Kongreso. Inter aliaj ili nomis komisionon por studi la temon pri Esperanta stenografio en Brajlo.

Ili faris rezolucion, postulantan, ke ĉiuj helpiloj por blinduloj estu importataj el iu lando al alia sen doganaj impostoj.

Ili rekomendis, ke la blinduloj aliĝu ne nur al blindulaj asocioj, sed ke ili vizitu la ordinarajn porvidulajn Esperantajn grupojn.

Ili decidis klopodi havi spacon en la ĉefaj Esperantaj gazetoj por ke la blinduloj anoncu sin serĉante vidantajn korespondantojn.

Ili decidis rekomendi, ke en ĉiuj nacioj oni organizu blindultagojn sub la titol-nomo *Tago de Louis Braille*.

Ili aŭdis prelegojn de blinduloj pri la ekonomia stato de la blinduloj en Nederlando, kaj la Esperanta movado en tiu lando, pri la blindaj masaĝistoj kaj diversaj porblindulaj metioj.

Estas elektitaj Honoraj Prezidantoj: S-ino Wanda Zamenhof (Polujo) S-ro H. J. Thilander (Svedlando) kaj S-ro W. P. Merrick (Britujo).

Ĉeestis 30 blinduloj el 10 landoj.

* * *

La Blindula Societo en Bournemouth invitis la blindajn Esperantistojn en la Kongreso, kaj regalis ilin ĉe temaĝo en la Rooper Social-Centro por Blinduloj en Winton apud Bournemouth. Dum la temaĝo oni klarigis la funkcion de la blindulzorga laboro en Bournemouth kaj la gastoj siavice parolis pri la klopodoj en siaj respektivaj landoj. S-ino Merrick donis inspiran priskribon pri la vivlaboro kaj kuraĝo de S-ro H. Thilander en Svedlando.

A.H.M.

I.I.K.

Internacia Instruista Kunlaboro kunvenis dufoje dum la kongreso. Ĉeestis proksimume 150 geinstruistoj. La kunvenojn gvidis S-ro W. Goodes. La jarraporto montras kreskantan intereson kaj praktikajn venkojn sur la lerneja kampo. Statutoj por la geinstruista kunlaborado estis akceptitaj. De nun la Internacia Instruista Kunlaboro havos la nomon **Internacia Ligo de Geinstruistoj Esperantistaj**. F-ino V. C. Nixon (Britujo) estis elektita prezidanto de I.L.G.E. S-ro E. Dahl (Svedujo) estis elektita sekretario-kasisto de la Ligo. Al la estraro apartenas F-ino J. Dedieu (Francujo) kaj S-ro P. Korte (Nederlando). Planoj pri la laboro estonta estis pritraktitaj.

E.D.

I.S.A.E.

Internacia Scienca Asocio Esperantista raportas: Post nia jarkunveno en Malmö la ĉefa laboro de la estraro estis unue la starigo de firma kaj laborkapabla organizo. Por tio estas celate, ke en kiel eble plej multaj landoj la delegitoj grupigu ĉirkaŭ sin enlandajn organizojn por ke la disvastigo de informoj kaj kunlaboro estu rapidigataj. Ankaŭ tiel la Esperantistaj sciencistoj kaj teknologoj povos pli efike kaj impone kontaktiĝi kun ne-esperantistaj fakaj rondoj. Delegitoj nun troviĝas en 19 landoj. Oni atingis en la pasinta jaro konsenton pri statuto kaj celas rigardi ĝin kiel fiksitan por almenaŭ tri jaroj, por ke oni ne eluzu energion por tiu flanko de organizo.

Feliĉa kaj valora progreso estis la eldonado de *Scienca Revuo* sub aŭspicioj de I.S.A.E. Pro tio ni ŝuldas grandan dankon al S-ro Muusses (Nederlando). La eldona nombro jam estas pli ol 700.

La financa stato de I.S.A.E. ne estas riĉa sed ĝi estas en bona ordo. La anaro estas konstante kreskanta, sed estas ne eble doni definitivajn ciferojn ĉar ili estos kontroleblaj nur en la fino de la jaro. Oni antaŭvidas minimume 1.000.

Raporto de la Brita Asocio montris, ke ĝi havas 120 anojn. Ĝi raportis bonan laboron precipe en kontaktlaboro kaj sur la terminara kampo. Studenta grupo fondiĝis en Kopenhago kun ĉirkaŭ 50 anoj, kiu jam faras aktivajn paŝojn. Okazas bona varbad-agado en Francujo kaj tio estas tre promesplena. La Nederlandanoj formis viglan nacian asocion de preskaŭ 100 anoj. Ĝi jam atingis valorajn kontaktsukcesojn.

Oni diskutis laborojn pri Unesco, vortarajn projektojn kaj principojn, kaj kunlaboron kun nia Lingva Akademio. Oni esploris la elekton de prezidanto post la nuna provizora periodo.

Estas evidente, ke ĉe la sciencoj kaj teknologioj la urĝa bezono de internacia lingvo estas sentata kaj la perspektivo por Esperanto estas bona. Necesas vigla kaj laŭcela laboro de Esperantistaj fakuloj.

Sume oni povas raporti, ke nia pasintjara agado starigis bonan fundamenton kaj ni speciale alvokas la kunlaboron de ĉiaj sciencistoj, teknologoj kaj personoj, kiuj interesiĝas pri tio. Nia celo estas *Esperanto en la sciencojn*! Per la agemo de ĉiuj ni povos atingi gravan sukceson.

E.D.D.

Katolikoj

Katolikaj kongresanoj faris komencon dimanĉe ĉe Preĝejo *Sacred Heart*, Richmond Hill. Partoprenis la Sankton Meson celebrata de Prof. M.

Carolfi el Romo iom malpli ol cent personoj. Predikis Prof. A. Beckers el Belgujo.

Je mardo kunvenis landaj delegitoj kaj I.K.U.E.-estraranoj. Ĉeestis reprezentantoj el ses landoj, Britujo, Italujo, Nederlando, Aŭstrujo, Belgujo kaj Irlando. La prezidanto de I.K.U.E., S-ro P. Heilker el Soestdijk, Nederlando, malfermis la kunsidon kaj skize raportis la agadon kaj klopodojn de la unuiĝo dum la pasintaj jaroj. Libera interŝanĝado rilate al kelkaj landoj ankoraŭ malhelpas nin, li diris, sed malgraŭ tio nia afero estas vivanta kaj katolika, kaj je la reapero de nia revuo *Espero Katolika* en la venonta aŭtuno ni povas antaŭvidi pluan pliboniĝon de I.K.U.E. Landaj delegitoj mallonge raportis, kaj la prezidanto klarigis kaj respondis demandojn. Prof. Carolfi anoncis, ke okazos en 1950 en Romo Internacia Katolika Kongreso kaj transdonis al ĉiu koran bonvenon.

J.W.V.

K.E.L.

S-ro W. A. Gething, prezidanto de la Kooperativa Esperanto-Ligo parolis pri la historio de la Brita Kooperativa movado. Li diris, ke la movado fondiĝis per la Pioniroj de Rochdale sur la bazo de samcelaj socialistaj provoj, kiuj malsukcesis, kaj donis informon kaj statistikojn pri la grava kaj granda potenco de la nuna kooperativa movado en Britujo.

S-ro A. A. Ager, sekretario de K.E.L. parolis pri kursoj aranĝitaj sub la aŭspicioj de kooperativaj edukaj fakoj, kontentigaj semajnfinaĵoj lernejoj aranĝitaj de K.E.L., kaj pri la graveco de fervoraj rilatoj inter la Londona Kooperativa Societo kaj la Ligo, fakto konstatebla per la presigo de 250 grandaj Esperantaj afiŝoj okaze de la Londona Antaŭkongreso, flanke de la nomita societo, kaj kiuj montriĝis en la ĉefaj subteraj stacioj en Londono. Rilate al tiu lasta, oni sendis saluttelegramon, konforme al la deziro de la kongresanaro en Bournemouth, al la Londona Societo.

Financa stato: la saldo en la kaso je la fino de marto 1949 estis tre kontentiga.

La propono, ke la nunaj oficistoj kaj komitatanoj estu elektitaj por la venonta jaro, estis unuanime aprobita.

A.A.A.

E.U.L.R.

La Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj kunvenis 8-an de Aŭgusto. S-ro E. K. Osmotherly, kiu prezidis, atentigis la ĉeestantojn pri la maltrankvilo en la religia menso en la nuna monda maltrankvilo, kiu grandparte kreskis el la novaj mondkonceptoj, kiujn donis al ni la scienco en la lasta jarcento. Kvankam multaj homoj ne povas plu kredi dogmojn, kiujn instruas iliaj eklezioj,

la homaro estas fundamente religia. La E.U.L.R. formiĝis en Decembro 1946 por kunligi tiujn Esperantistojn, kiuj volas ami kaj servi Dion kaj per la menso kaj per la koro, sed kiuj ne volis kateni sin per antikvaj dogmoj. Li mallonge priparolis la ĝisnunan agadon de la Unio menciante la Somerlernejon en Sussex, kaj la ĉiumonatan Diservon en Londono. Li atentigis al la membroj la novan himnaron, kiu enhavas 48 himnojn de liberala karaktero. La Unio havas 49 membrojn en 11 landoj. Poste parolis la prezidanto de la Unio, Pastoro W. Carter, kiu elektis kiel temon *Liberala Religio kaj kelkaj mondproblemoj*.

Literaturamantoj

Sub prezido de Prof. G. Waringhien kunvenis trideko da literaturamantoj en la Urbdomo. La prezidanto skizis malnete la evoluon de la Esperanta literaturo de la fruaj verkoj de Zamenhof ĝis la plej lastaj provoj de la nova skolo de verkistoj, aparte emfazante la altvaloran kontribuon de la revuo *Literatura Mondo*, kies 17-jara ekzisto ebligis literaturan esprimon al ĉiam pli kreskanta nombro da beletristoj en la lingvo internacia.

Sekvis diskuto pri la malhelpoj rilate al legado kaj konsulto de valoraj klasikaj verkoj nun elĉerpitaj kaj oni esploris la ekzistantajn rimedojn —bibliotekojn de landaj kaj Esperantaj instancoj k.s.—kaj diskutis la eblojn de pruntaranĝoj. Oni esprimis deziron, ke la B.E.A.-biblioteko kunlaboru en la kadro de la enlanda oficiala bibliotek-sistemo, kiu permesas prunton de kiu ajn libro pere de lokaj bibliotekoj.

Punkto du estis ekzamenoj de la kulturaranĝoj de la U.K. kaj la kunsido esprimis sian bedaŭron, ke la L.K.K. de la 34-a ne efektivigis la proponojn de la kongreso en Malmö rilate al aranĝo de Literatura Vespero aŭ Literatura Konkurso, kaj ĝi forte admonas la organizantojn de la 35-a, ke ili loku tiun aferon alten en la kadro de la Kongresprogramo. Oni faris konkretan proponon, ke la Ekspozicio de Infanaj Desegnoj, kolektitaj de Richard Levin en Lyon, formu la kernon de ekspozicio arta, ĉirkaŭ kiu oni konstruu pliampleksan ekspozicion de artobjektoj internacie kolektitaj. La kunsido finiĝis per legado de literaturaj pecoj de R. Schwarz kaj Kalocsay.

M.S.

Pacifistoj

La Internacio de Milit-Rezistantoj aranĝis fakkunsidon, kiun partoprenis 72 kongresanoj. Prezidis S-ro A. Tucker (Anglujo) kaj parolis S-ro R. Bland (Anglujo). S-ro Tucker iom klarigis la laboron de la Internacio (War Resisters International) tra la mondo. Ĝi kunligas la diversnaciajn militrezistantojn, kiuj pro sia rifuzo partopreni militon estas persekutataj, kaj

donas helpon, ofte treege valoran, al individuoj en malfacilaj cirkonstancoj kaj al grupetoj da persekutatoj.

La parolado de S-ro Bland traktis pri la neceso deturni nin de la neefikaj por paco militrimedoj, kaj emfazis, ke la nacioj sopiras al paca mondo, sed bonintence, kuraĝe kaj memofereme ili militadas por sekurigi la patrujojn, havigi al si liberecon, starigi demokratian mondpolitikon. Tamen post ĉiu penado tia, restas timo kaj suspekto inter la nacioj.

R.B.

Socialdemokratoj

La Socialdemokrata kunveno estis aranĝita de la Laborpartia Esperanta Asocio. S-ro Bland prezidis kaj S-ro F. Parker (Anglujo) donis interesan raporton pri la sukceso de la laborista reĝimo en Britujo. La kunsido decidis, ke la organizaĵo ankoraŭ ne povas eldoni socialdemokratian gazeton en la nuna tempo. Kelkaj personoj esprimis la opinion, ke la organizaĵo ne povas resti en la kadro de U.E.A. pro ties neŭtraleco, kaj aliaj opiniis, ke ĝi krome ne povas esti frakcio de S.A.T. pro ties parti-neŭtraleco. Ĉi tiu kunveno estis la unua kunsido de Esperantistaj Socialdemokratoj en la kadro de U.K. post la milito.

H. de V.

T.E.J.A.

La tria ĉiujara kunsido de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio en la kadro de U.E.A.-kongresoj okazis 9-an de Aŭg. en la Urba Kolegio. Dudek kvin profesiaj ĵurnalistoj el diversaj landoj partoprenis. Prezidis S-ro Julin el Stockholm. Post aprobo de la morala kaj financa raportoj kaj elekto de novaj estraranoj, interesa diskuto elvolviĝis pri la ebloj—tre diversaj laŭ la landoj—propagandi por Esperanto en la naciaj gazetoj, en ili presigi diverstemajn artikolojn el Esperanto tradukitajn, kaj profitigi la membrojn de la Asocio, pere de T.E.J.A., pri la favoroj konsentitaj en iuj kaj aliaj landoj al profesiaj ĵurnalistoj. S-ro Adamson atentigis la ĉeestantojn pri la oportuneco de T.E.J.A.-anoj partopreni la internaciajn konkursojn, eventuale aranĝotajn de registaroj kaj ne-esperantistaj organizaĵoj. Laŭ propono de reprezentanto de Argentino, studo pri aperigo de Esperantista ĵurnalo redaktita de profesiaj ĵurnalistoj estis farita, sed pro ekonomiaj kaŭzoj, la realigado bedaŭrinde ne ŝajnas baldaŭa.

U.L.

La kunsidon de Universala Ligo gvidis F-ino M. H. Vermaas ĉar aliaj estraranoj ne povis ĉeesti. Kvardek personoj partoprenis. Oni legis salut-telegramon de la Brita reprezentanto S-ro P. H. Wright. Post bonvenigo en la nomo de la estraro, F-ino Vermaas klarigis la situacion en la Centra

Oficejo kaj ion rakontis pri la laboroj kaj malfacilaĵoj de la estraro. Grava kaj ĝojiga fakto estis, ke malgraŭ manko de oficistoj kaj amasigo de laboro, ĉiuj aferoj en la Centra Oficejo, precipe la librotenado kaj administrado, estas en perfekta ordo. Estas prokrasto, sed estas neniam malordo. Estas nun novaj planoj por solvi la oficistan problemon. La jarkunveno de U.L. estas fiksita je la 22-a de Oktobro en Rotterdam. Oni parolis pri la rezolucio proponita al la Kongreso de la *World Movement for Federal Government* okazonta en Stockholm en la fino de la monato. Oni diris, ke temas ne pri subteno de U.E.A. sed de la Kongreso en Bournemouth.

Sekvis raportoj de la landaj reprezentantoj, kelkaj legataj kaj kelkaj donataj persone. En la sekvinta debato, partoprenis precipe la reprezentantoj de Francujo, Egiptujo kaj Svedujo kaj la lasta klarigis la funkciadon de la Nord-Eŭropa Instituto.

M.H.V.

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je 31-a de Aŭgusto 1949

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	3245	202.8
2. Islando ..	500	630	126.0
3. Svedujo ..	4100	4954	120.8
4. Belgujo ..	1700	1951	114.7
5. Portugalujo	700	765	109.3
6. Germanujo ..	1600	1595	99.7
7. Aŭstralio ..	950	925	97.4
8. Usono ..	3000	2888	96.3
9. Brazilo ..	2000	1896	94.8
10. Danlando ..	3200	2970	92.8
11. Nederlando	5400	5002	92.6
12. Britujo ..	13000	12015	92.4
13. Urugvajo ..	250	230	92.0
14. Nov-Zelando	900	824	91.5
15. Polujo ..	4000	3595	90.0
Svislando ..	1400	1260	90.0
16. Italujo ..	1600	1425	89.0
17. Argentino ..	900	705	78.3
18. Finnlando ..	2000	1565	78.2
19. Norvegujo ..	1300	1010	77.7
20. Francujo ..	6200	4714	76.0
Sud-Afriko ..	250	190	76.0
21. Egiptujo ..	300	225	75.0
Kanado ..	300	225	75.0
22. Hungarujo ..	1800	1295	71.9
23. Izraelo ..	400	240	60.0
24. Irlando ..	300	170	56.6
25. Aŭstrujo ..	1000	565	56.5
26. Hispanujo ..	1200	480	40.0
27. Bulgarujo ..	1600	280	17.5
28. Ĉeĥoslovakujo	5300	485	9.2

Jugoslavujo plifirmigis sian pozicion per subita salto al pli ol 200% ; gratulon ! Estas interese rimarki ke tiom da landoj preskaŭ atingis 100%, kaj espereble ĉiu ĝis n-ro 22 sukcesos tion fari antaŭ la fino de la jaro.

Almelo ; ilustrita faldprospekto kun nederlanda, franca, angla kaj esperanta tekstoj. Informejo por fremdultrafiko "Het Verkeershuis", Grotestraat 80, ALMELO, Nederlando.

Mondkonata rondo



Geaktoroj de "Verda Stacio" en Ĉeĥoslovakujo. Starantaj (de maldekstre): s-anoj Frant. Landsman, Miloš Nyvlt, Jan. Valeš, Esp. gvidanto de "V.S." Antonín Slanina, Václav Lorenc, Bohumil Semerák, Antonín Klimeš, ĉefreĝisoro de "V.S." Josef Bezdiček. Sidantaj (de maldekstre): Václav Piskaček, Bedřich Bobek, Zdenka Švabíková-Kožíková, Karel Höger, Ludmila Klimešová, Jaroslava Vacková.

Ĉiutaga vere internacia Esperanto-gazeto !

Redaktoroj : Edmond Privat, Vladimir Slany, Huguette Royer kaj aliaj gravaj samideanoj.

Rubrikoj : Informoj, Esperanto en la mondo, Literaturo, Scienco, Teatro, Leterkresto, Por la junularo k.s.

Aldonoj : Esperanto-kursoj en naciaj lingvoj, Artvespero.

Provnumeron oni ricevas senpage.

Abonkostoj : Simpla abono—afranko de letero eksterlande ĉiumonate ; Abonanto-subtenanto—pagas laŭvole pli. Ĉiu abonanto kaj precipe ĉiu abonanto-subtenanto helpas pligrandigi la amplekson de nia gazeto.

Kara samideano : Ne estas utopio. Tiu gazeto ekzistas jam de kelkaj jaroj kaj kreskas kun ĉiu jaro. Tio estas parolata gazeto kaj vi povas ricevi la francan paĝon ĉiutage agordinte vian radioricevilon je ondolongo ĉirkaŭ 31m. La bulgara paĝo aperas sur la ondo 39.11m. Pri alilandaj paĝoj vidu la Radiokalendaron en ĉiu numero de via revuo.

Kaj por daŭre ricevi tiujn eldonojn vi bezonas nur skribi unu leteron ĉiumonate al la sendintaj stacioj. Vi eĉ povas ricevi la gazeton nefarante tion, sed ne estu ŝtelisto ! Jen vidu la kreskon de nia gazeto. La unuan semajnon de la jaro 1947 ĝi havis 27 paĝojn (meznombre po 10 minutoj). En la unua semajno de 1948 jam aperis 38 paĝoj ; kaj en la unua semajno de la

nuna jaro la abonantoj ricevis 42 paĝojn, sed nun aperas jam pli ol 50 paĝoj ĉiusemajne.

Abonu. Vi havos la plezuron. Esperanto havos la utilon !

Gustav Hirsch, Izraelo.

La Ideo

Iam vivis imperiestro kaj iu judo. La judo havis multe da mono kaj ideon. Iam okazis, ke la judo iris al la imperiestro kaj faris al li proponon : "Via moŝto", li diris, "mi havas ideon. Mi volas konstrui novan komunikilon laŭmodan. Sur ĉi tiu nova vojo, kiun mi volas konstrui de Vieno ĝis Brno kaj eble iom plu, la veturiloj ne estos tirataj per nature kreskintaj ĉevaloj, sed per arte konstruitaj vaporĉevaloj. Tia konstruita ĉevalo, ni diru lokomotivo, tiros samtempe plurajn veturilojn kaj eĉ multe pli rapide ol la plej bonaj naturaj ĉevaloj." "Sed, sed", diris la imperiestro, "veturas ja ĉiusemajne trifoje la poŝta kaleŝo inter Vieno kaj Brno kaj tiu ofte estas duone malplena. Cetere, por kio ni havas niajn bone kreskintajn ĉevalojn, kiuj certe pli bone tiras kaj pli fidinde, ol tia artefarita ĉevalo. Kia freneza ideo !"

La judo ne cedis sed daŭre petadis la imperiestron pri permeso konstrui fervojon. Fine la imperiestro diris al siaj ministroj : "Lasu al tiu freneza judo lian ĝojon !"

Tiel estiĝis la Kaiser-Ferdinands-Nordbahn kaj ĝi efektive estis konstruita pli longe ol nur ĝis Brno. Krome fervojoj estis daŭre konstruitaj kaj nun oni ne povus imagi Eŭropon sen fervojoj.

Multaj jaroj pasis. La tempoj aliĝis kaj al tio multe kontribuis la fervojoj. La ĝenerala trafiko pligrandiĝis, la landoj kvazaŭ malgrandiĝis, la popoloj pli kaj pli kontaktiĝis kaj fariĝis reciproke interdependaj.

Denove aperis homo kun nova ideo. Ankoraŭ judo. Tamen monon li ne havis. Tiu malriĉa homo ne sin turnis al imperiestro sed al la kompatindaj suferantaj homoj. Li direktis sin al tiu homaro kaj diris : "Jen mi proponas al vi novan komunikilon per kiu vi povos komunikiĝi kun via najbaro. Artefaritan lingvon mi donas al vi. Ĝi estas multe pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj kaj kondukus al ĝenerala interkompreno inter la popoloj."

La homoj tamen diris : "Tia stulta ideo, artefarita lingvo ! Lingvo ja estas io kreskinta nature kaj ne estas arte farebla !" Kaj ili priridis la viron kun la stulta ideo, tamen kun escepto de malmultaj homoj. Tiuj ĉi malmultaj nomas sin Esperantistoj kaj samideanoj. Ankoraŭ ne grandnombraj, ili tamen estas disvastigitaj tra la mondo. Iam venos la tago, kiam oni miros, ke la homaj rilatoj povis daŭre funkcii sen tiu komunikilo.

O. Sinner, Aŭstrujo.

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

(N-ro 17—Julio 1949)

Elekto de akademiuloj

La rezultato de la elekto por la Akademio estis fiksata la 14-an de Julio 1949 en Hago en ĉeesto de la Akademiuloj A. Cseh, T. Jung kaj la subskribinto. La kalkulado montris, ke la 773 validaj voĉoj estis jene dividitaj inter la 54 kandidatoj:

Kandidato	lingvo	Nombro de voĉoj
V. S. Setälä	finna	37
M. C. Butler	angla	35
D-ro K. Kalocsay	hungara	35
D-ro W. Lippmann	germana	35
	(en Usono)	
A. Cseh	hungara	34
	(en Nederlando)	
D-ro A. Stamatiadis	greka	34
R. Hromada	ĉeĥa	26
D-ro F. Szilágyi	hungara	25
	(en Svedujo)	
J. A. de Saldanha Carreira	portugala	24
K. H. P. Bennemann	germana	23
D-ro A. Czubrynski	pola	23
C. A. G. Domingues	brazila portugala	23
R. E. Bugge-Paulsen	norvega	22
D-ro A. Pitlik	ĉeĥa	22
C. Støp-Bowitz	norvega	22
A. O. Bünemann	germana	21
D-ro L. d. C. Porto Carreira Neto	brazila-portugala	21
G. Chavet	franca	19
G. Avril	franca	16
W. J. Downes	angla	16
D-ro W. A. Solzbacher	germana	16
	(en Usono)	
J. Couteaux	franca	15
G. J. Degenkamp	nederlanda	15
F. A. Postnikov	rusa (en Usono)	14
S-ino D. Tappan Connor	usona-angla	14
P. Rosa	slovaka	13
K. L. Söderberg	sveda	13
F-ino J. Baird	angla	12
M. Butin	germana	12
D-ro L. Blaas	aŭstra-germana	11
A. T. S. O. Jansson	sveda	11
T. Pendlebury	angla	10
N. Barthelmess	germana	9
	(en Francujo)	
W. W. Padfield	angla	9
G. Saville	usona-angla	9
A. Camuffo	itala	8
	(en Trieste)	
P. Heilker	nederlanda	8
N. H. C. Macpherson	angla	7
T. Hodakowski	pola	6
J. Zawada	pola	6
K. T. B. Gerdman	sveda	5
L. J. Thévenin	franca	5
F. A. F. Faulhaber	nederlanda	4
P. A. M. Laignier	franca	4
Inĝ. O. A. Rygg	norvega	4
G. K. F. Ziegler	germana	4
J. R. Stenström	sveda	3
M. Sygnarski	pola	3
P. J. Tardieu	franca	3
J. Wenger	svisa-franca	3

R. Rian	norvega	2
F-ino J. Ender	pola	1
F-ino M. K. A. Laade	germana	1
G. Schulz	germana	0

Ĉar estis 21 vakaj lokoj, la sekvantaj personoj estas elektitaj Akademiuloj:

malnovaj membroj: Setälä, Butler, Kalocsay, Lippmann, Cseh, Stamatiadis, Hromada, Szilágyi, de Saldanha Carreira, Czubrynski, Domingues, Bugge-Paulsen, Pitlik, Porto Carreiro Neto kaj Chavet;

novaj membroj: Bennemann, Støp-Bowitz, Bünemann, Avril, Downes kaj Solzbacher.

Ir. J. R. G. Isbrucker, Prezidanto.

Slovaka Esperanto-Kongreso

Okazis la 30-an de Julio ĝis 1-a de Aŭg. en Bratislava sub protekto de la komisiito por informado kaj klerigo Prof. D-ro A. Pavlík, la kongreso de la slovakaj Esperantistoj. Partoprenis pli ol 300 gesamideanoj el tuta Ĉeĥoslovakujo.

Dum la tradicia Interkonatiĝa Vespero la klubanoj el Košice prezentis orientslovakajn kantojn kaj dancojn en naciaj kostumoj, kaj la grupanoj el Brno-Zidenice amuzis la ĉeestantojn per riĉa kantrepertuaro. Dimanĉon matene Pastro Titus Bohnyák celebris katolikan meson, kaj predikis evangelia pastro Vl. Kubovčák. En la oficiala malfermo salutis reprezentantoj de la komisiito por informoj kaj klerigo fakestro Julio Sveda, kaj de la urbestro, oficiala slovak inform-agentejo ZAS, EAĈSR kaj kelkaj grupoj. Dum la kunsido oni diskutis organizajn problemojn kaj elektis la estraron. Posttagmeze okazis ŝipveturo sur Danubo.

Lundon matene okazis ekzameno pri lingvoscio, dum kiu 20 gesamideanoj ricevis diplomon. Okazis faka kunsido de Esperanta agrikultura kooperativo, kaj D-ro Izák faris lumbildoprelegon pri la slovakaj grotoj. Oni decidis, ke venontjare la kongreso okazos en Piešťany.

Veteranoj !

Eĥon de la parolo de nia redaktoro en la ĉefartikolo de Junio rilate al samideanoj, kiuj partoprenis ĉiujn kongresojn en Britujo, ni ricevis per la jena noto: "Ankoraŭ vivas kaj seninterrompe partoprenas la movadon (mense, kvankam ne plu fizike) F-ino Ŝefer (84) Esperantistino de 1903, kiu dum multaj jaroj ĉe la L.K.K. forte subtenis nian aferon. (Vidu *Enciklopedio*). En 1905 mi aliĝis al la Londona Klubo kaj en 1907 ni ambaŭ ĉeestis la Trian Kongreson kaj la Postkongreson en Londono. Lila S. Grant, 32 Ridge Road, London, N.8."

Nia Felietono :

KAPTITOJ SUR LA GLACIROKO

F. Omelka

VIII. La malsupreniro

La sciigo pri la decido de Payen estis akceptata kun malfido. La perditoj ne kredis, ke tiom kolrompa entrepreno povus sukcesi.

“Unue la vertikala rokmuro, pri kiu vi rakontis al ni,” diris la vojaĝanto kun rompita piedo. “Mi mem ja ne estas montgrimpulo, sed mi havas amikon, kiu komprenas tiujn aferojn. Mi scias, kiom multe estas necesa por tia malsupreniro. Kaj kion ni havas ĉi tie? Vi ja ne havas eĉ la fundamentan objekton, sen kiu tia malsupreniro estas tute nebla.”

“Pri kio vi pensas?”

“Ŝnurego!”

Ili rigardis Payen plenaj de streĉa atento.

“Tion mi ne havas,” li respondis trankvile, “sed mi havos ĝin. La ideo trafis min antaŭ momento. Se ĉi tiu ideo venus en mian kapon hieraŭ, nun mi jam estus malsupre. Ĉu vi memoras, sinjoro Bernier, kiel malfacile ni liberigis sinjoron Bakker de la paraŝutŝnuroj, kiam ni trovis lin en la neĝblovaĵo?”

“Tre bone.”

“Nu, ni pretigos la ŝnuregon el la paraŝuto.”

“Tiu ne tenos vin!”

“Vi falos en la abismon!”

El tio, kiel ili persvadis lin kaj avertis, estis videble kaj senteble, kiom amikaj ili dum tiuj kelkaj tagoj fariĝis.

“Ni faros ĝin tiom firma, ke ĝi eltenos—ĉu ne, fraŭlino?” li turnis sin al la stevardino, kiu prenis la paraŝuton kaj explore ĝin palpis.

“Mi opinias, ke ĝi estos sufiĉe forta, “ŝi respondis. “Ni faros tion zorge.”

“Sed se vi sukcesus malsuprengrimpi tiun rokmuron,” avertis plua vundito, “vi vojerarus en la montaro. Precipe se malleviĝus la nebulo. En nebulitaj montoj estas fremdulo eĉ sperta montgrimpulo, kiu alitempe sentas sin tie kiel hejme. La montoj estas tiom ŝanĝitaj, ke ili aspektas tute alie ol normale. Kaj se tio trafus ĝuste vin?”

“Tio je estus malbona,” konsentis Payen. “Sed ŝajnas, ke bela vetero ankoraŭ daŭros.”

Ili provis persvadi lin, ke li restu sur la glacioko. En ĉiu momento povas aperi la sava aeroplano aŭ grupo de montgrimpuloj—kaj en tiu kazo kial peni aŭ eĉ oferi sin?

Sed Payen persistis ĉe sia decido.

Kiam ili ekkomprenis, ke lin nenio detenos, ili proponis sin al li kiel kunulojn. La radiotelegrafisto, Bakker, la stevardino. Kaj fine aliĝis ankaŭ la maljuna, vundita Generalo Gibson.

“Ne,” rifuzis ilin energie Payen. “Vi ĉiuj devas resti ĉi tie. Fraŭlino kiel helpantino de sinjorino Gibson, la ceteraj pro la vunditoj. Ni ja ne povas lasi la pacientojn ĉi tie sen protekto.”

Ili protestis, ke por tio sufiĉas unu viro.

Payen restis necedema.

Dume la stevardino kaj sinjorino Gibson ekpreparis la paraŝutaĵon kaj komencis kunplekti la ŝnuregon. La laboro rapide progresis.

Kelkfoje ili havis la impreson, ke ili aŭdas bruon de aeroplano. Ili lasis ĉion kaj esplorrigardis la firmamenton. Vane.

“Aŭ ni estas jam tiom incititaj,” rimarkis ĉagrene la Generalo, “ke ni aŭdas tion, kio ne ekzistas—aŭ ni malsukcesadas.”

Li estis prava pri ambaŭ. Ili estis jam efektive incititaj per daŭra streĉo, sed ili ankaŭ malsukcesis. La bruoj, kiun ili aŭdis, ne estis nura fantomo. La esploraviadiloj kelkfoje dum sia serĉado alflugis tiom proksime de la perditoj, ke ili vere ilin aŭdis.

Malfrue posttagmeze la ŝnurego estis preta. Ĝi mezuris dek ok metrojn.

Payen maltrankviliĝis.

“Mi iros provi ĝin,” li diris. Kiu povis moviĝi, iris kun li.

Sur la rando de la abismo li ĵetis ĝin, kunmetitan en du partoj. La ŝnurego atingis apenaŭ duonon de la rokmuro.

“Kion nun?” demandis Bakker.

“Ĉi tie ĝi ne malhelpos,” diris Payen kvazaŭ al si mem kaj lia rigardo vagis sur la neĝkampoj, kiuj etendiĝis sur la deklivo apud la vertikala rokmuro. “Vi tenos unu finon de la ŝnurego ĉi tie, aŭ ni ligos ĝin per la krampo, kaj poste, kiam mi estos malsupre, vi ĵetos ĝin al mi. Per tio, ke mi uzos ĝin unuoble sed ne duoble, kiel mi devus fari, la ŝnurego atingos ĝis la fundo. Sed en aliaj lokoj—?”

Cetere ŝajnis, ke malsupre tiaj krudaj, vertikalaj rokmuroj ne ekzistas. Ili ja vidas ĉion nur de malproksimo kaj el alto, kaj de tie la blanka maro ŝajnis unu kontinua surfaco. Sed kio atendas la bravulon post lia malsupreniro?

“Nur ke la ŝnurego ne ŝirdifektiĝu, estante nur unuopa,” diris la radiotelegrafisto.

Ili faris kelkajn pezo-provojn. La ŝnurego ne difektiĝis.

Poste ili forbalais la neĝon kaj iom malproksime de la rando englaciigis la ŝtalstangon. Tie ili morgaŭ matene alligos la ŝnuregon

Ili revenis al la aeroplano. La dorsosakon pretigis al li ambaŭ virinoj el la valizo, en kiu la radiotelegrafisto havis diversajn ilojn. Krom tio li preparis al si martelon, hakileton, kelkajn ŝtalajn stangojn, alumetojn, bandaĝojn

Fine ĉio estis preta. Ree kaj ree ili konsiliĝis, ĉu ili nenion forgesis.

Neniu pensis pri dormo. Malsato komencis ilin ege turmenti. La sanaj pasaĝeroj ne manĝis jam de la hieraŭa vespero. Dum la tuta tempo ili trinkis nur iom da varmega teo. Sed ĝuste pro tio, ke ĉiuj pensis pri la manĝaĵo, neniu pri ĝi parolis.

Payen devis al ili denove rakonti la tutan historion pri Daumal. Pri tiu li pensis pli multe ol pri la vojo, kiu lin atendas.

“Do kiom da tagoj restas ĝis la fino de la proceso?” demandis sinjorino Gibson.

“Se la antaŭdiro de *Paris Soir* estas ĝusta,” respondis Payen, “la verdikto estos dirita post tri tagoj.”

Frosto trakuris iliajn dorsojn. Pri ili eble jam estis dirita la verdikto. Diris ĝin senkompataj montegoj. Kaj ilia morto estos eble pli malbona ol tiu de Daumal. Pli malbona, ĉar pli longedaŭra. Sed tio estis alia afero. Ili flugis, ili frakasiĝis. Akcidento, malfeliĉo. Tragedio. Sed tie . . . tie temas pri terura eraro. Kaj ĝi estas pli ol nura eraro. Ĝi estas ja perforto, kiun faros homoj al homo. Kaj plej malbone estas, ke oni faras tion ne pro malbona volo

Ĉio estis tiom stranga La malsataj pasaĝeroj sciis, kio atendas ilin, se ili ne estos trovitaj ĝustatempe. Kiel longe ili tiel eltenos? Eble ĝuste ĝis tiu momento, kiam Daumal estos ekzekutata. Ili mortos unu post la alia, turmentataj de la malsato, de la doloroj en vunditaj membroj, de la frosto—sed precipe de la malsato, kies fantomo jam ĉirkaŭflugas super ili. Ili povis imagi al si, kion signifas tia mortado. Kiomfoje ili jam legis pri la blanka morto en priskriboj pri polus-ekspedicioj!

Kaj tamen—afero stranga kaj kortuŝe homa—tiun vesperon ili ne pensis pri tio, kio atendas ilin. Ili ne pensis pri tio, ke sukceso de la malsupreniro de Payen signifos liberigon, savon kaj vivon por ili. Ĉiuj iliaj pensoj estis direktataj al la malfeliĉa Daumal. Ĉu venos Payen ĝustatempe? Kaj ĉu li fakte venos?

Ili denove pensis pri tio, kiel mizere li estas preparita por sia vojo. Kun ekipo, kiun ĉiu

montgrimpulo sincere priridus. Kun malsata stomako. Kiamaniere kutimas tion fari la montgrimpuloj? Matene abundan matenmanĝon, en la dorsosako pecojn de lardo kaj pano, krom tio paketon da ĉokolado. Kaj ĉio tio post la dormo, kiu fortigis la korpon por eksterordinaraj agoj. Payen estas malfortigita. Ja kiaj estis noktoj sur la glaciroko!

“Ni dormu, amikoj,” diris sinjorino Gibson. “Sinjoro Payen iomete ripozu.”

La “bonan nokton”, kiu sonis ĥore post ŝiaj vortoj, estis pli varma kaj pli mola ol iam.

La sola, kion povis al ili la kruela naturo en tiu nokto prezenti, estis trankvilo. Ankaŭ ĝi estis al ili rifuzita. Dufoje ili estis vekataj de malhelaj frapoj.

Ili vekiĝis tuj je la krepusko. Scivole ili elrigardis. Kian seniluziigon preparis al ili denove la montegoj? Ho—ili tamen scipovas ankaŭ karesi! La suno leviĝis super la horizonton kaj inundis per sia oro la blankajn pintojn. Kia panoramo ĝi estus dum aliaj cirkonstancoj!

Payen rapide preparis sin. Li ne volis perdi eĉ unu minuton. La tago, kiu eble decidus pri ĉio, komenciĝas. Kiel ĝi finiĝos?

Li adiaŭis la malsanulojn. Neniu multe parolis. Palaj vizaĝoj provis rideti, sed ne sukcesis. Nur la okuloj parolis.

Al la loko de malsupreniro iris kun li ĉiuj sanaj kaj Generalo Gibson. Li tenis per la mano la bandaĝon sur la nazo kaj kuraĝe vadis tra la neĝo kun la aliaj. Sinjorino Gibson lin vane persvadis, ke li restu en la aviadilo.

La lasta manpremo. Ĉu ili havis preparitaj kuraĝigajn vortojn por la viro, kiu veturos sur la maron en la barko? Ili ne estis kapablaj eldiri ilin. Ĝi estis tro granda momento en ilia vivo.

Ili provis la stangon. Ĝi eĉ ne moviĝis. Poste ili alligis al ĝi la ŝnuregon, kiu jam atingis ĝis la fundo.

Marcel Payen lokis ĝin sub la maldekstran kruron, liberan parton li superĵetis trans la ŝultron kaj tie li ĝin prenis per la dekstra mano. Per la maldekstra mano li tenis la streĉitan parton, kiu pendis de la stango ĝis lia kruro.

Poste li komencis malsuprenlevi sin. La dekstran manon li ŝovis iomete malsupren, per tio la ŝnurego liberiĝis kaj la korpo per sia pezo glitis iom pli malsupren. En la sekvanta momento li liberigis la maldekstran manon—kaj tiamaniere ĝi progresis senĉese. Li konis tiun manieron de la malsuprenirado el la junaj jaroj. Li sciis, ke se li sin malsuprenlevus libere pendante, li bruletigus al si la manojn.

Post kelkaj minutoj li estis malsupre.

“Kia estas la neĝo tie?” ili demandis lin, singarde kliniĝante super la randon.

“Tute bona!”

Ili ĵetis al li la ŝnuregon. La lasta ligilo inter Payen kaj la ceteraj pasaĝeroj estis rompita.

“Feliĉan vojaĝon!” ili vokis al li. “Kaj ĝis la revido!”

“Ĝis la revido!” aŭdiĝis mallaŭte el la profundo.

Ili sekvis lian iron paŝon post paŝo. Ili vidis, ke li vadis sur kelkaj lokoj ĝis la zono, sed li progresis. La milda deklivo plifaciligis al li la iron.

Jam li paŝis proksimume tri cent metrojn.

En tiu momento vokis Generalo Gibson:

“Sinjoro Payen!”

Payen haltis.

“Mi volas nur diri al vi, ke en la poŝo de la dorsosako vi havas unu biskviton!”

“Sinjoro Generalo—!”

“Ĝi restis al mi de la hieraŭa tago, ĝi ne estas ŝtelita, estu trankvila! Feliĉan vojaĝon!”

Kiel delikate dirite: Ĝi restis!

Por reveni li ne povis eĉ pensi. En la afero estis io nobla.

Payen jam silentis. Li svingis per la stango kaj daŭrigis la iradon.

Post ĉirkaŭ horo li venis al la loko, kie la deklivo turniĝis maldekstren.

Li turnis sin. Liaj amikoj staris ankoraŭ apud la rando de la abismo kaj svingis por adiaŭi.

Ankaŭ Payen svingis. Poste ankoraŭ kelkajn paŝojn—kaj li estis sola.

Antaŭ li etendiĝis senfina deklivo. Ie en kapturita malproksimo, profunde sub la loko, sur kiu li staris, etendiĝis la valo. Tie certe kuŝas vilaĝeto aŭ urbo. Aŭ almenaŭ turista kabano.

Singarde li malsupreniris. La stango faris al li bonegajn servojn. Kiam li iris al la lokoj, kie la neĝtavolo estis tre maldika, li devis esti ankoraŭ pli singarda. Liaj piedoj ofte forglitis, li ŝanceliĝis, kelkfoje li falis—kaj unufoje li falegis sur la deklivo almenaŭ du cent metrojn kiel sur glitrelvojo.

Kelkajn tiajn lokojn kaj mi estus tuj malsupre, li pensis kontentige kiam li konstatis, ke li estas sendifekta kaj nenion perdis.

Poste lin haltigis neatendita malhelpo. En la glacioko estis profunda kaj sufiĉe larga krevajo. Ĝi etendiĝis dekstren kaj maldekstren, kiom la akulo povis vidi.

Li ne longe pripensis. El la dorsosako li eltiris ŝtalan krampon, englaciigis ĝin, pendigis

sur ĝin la ŝnuregon kaj sin malsuprenlevis. Ĝi sukcesis multe pli facile ol la antaŭa malsuprenleviĝo ĉar la muroj de la krevajo estis oblikvaj.

Pli malbona estis la vojo supren. Li devis serĉi elstaraĵojn, sur kiuj li povus reteni sin. La elstaraĵoj estis glataj kaj kelkfoje li preskaŭ falegis malsupren denove.

Fine li respiris. La danĝera loko kuŝis malantaŭ li.

Li paŝis jam ĉirkaŭ tri horojn. La suno komencis agrable varmigi.

Malgraŭ tio, ke li estis jam tre laca, li ne kuraĝis dum momento halti kaj ripozi. Ĝis tie malsupre.

Li iris jam sufiĉe senzorge. Ŝajnis, ke la deklivo formis ĉi tie seninterrompan neĝkampon.

Preskaŭ senpense li pikis per la stango en la neĝon antaŭ si. Subite li haltis. La stango trapenetris la neĝtavolon kaj poste ĝi glitis malsupren tute libere, kvazaŭ ĝi penetris en la malplenan spacon!

Li rapide retiriĝis. Kion tio signifas?

Li ĉirkaŭrigardis. La neĝkampo estis ondigita. La vojon de Payen krucigis profundaĵeto, je la unua rigardo apenaŭ videbla.

Kelkajn paŝojn li foriris dekstren kaj singarde proksimiĝis al la profundaĵeto. La stango ĉiam tuŝis firman fundon. Kaj poste ĝi ree penetris en la malplenan spacon sub la surfaco!

Li provis tion ankoraŭ kelkfoje sur aliaj lokoj. La rezulto estis ĉiam la sama.

Ĉio estis al li klara. Li atingis krevajojn, kies surfaco estis superblovita per la neĝo kaj tiamaniere estiĝis tiel nomata ponteto. Unu el la plej grandaj danĝeroj, kiuj atendas la montgrimpulon! Kiu malatentas la mildan profundaĵeton kaj ekpaŝas sur la ponteton per la tuto de sia korpo, tiu trafalas malsupren, en nekonatan profundaĵon . . .

Payen jam transiradis tiajn pontetojn. Sed tio okazis ĉiam nur en pli granda societo, kiun gvidis sperta gvidanto.

Hodiaŭ li estas ĉi tie sola

Li iris sufiĉe longe laŭ la krevajo. Eble li malkaŝos ĝian finon.

Sensukcese.

Restis nenio alia, ol provi transiri la krevajojn sur la malcerta ponteto.

Li enpikis la stangon ree kaj ree. Li provis, en kiuj lokoj la ponteto estas plej dika.

Fine li havis la impreson, ke li trovis la plej firman lokon.

Unue li certigis sin. Li forgratis neĝon kaj en la firman fundon li batis krampon, al kiu li alligis la ŝnuregon. Ĝian liberan finon li alligis al la korpo. Se li trafalus, li povus suprengrimpi helpe de la ŝnurego.

Poste li kuŝigis sin sur la ventron, dismetis manojn kaj krurojn, kaj malrapide, tre malrapide li rampis antaŭen. Li sciis, ke tiamaniere la pezo de lia korpo estas dividita sur la larĝa surfaco. Se li irus per normala maniero, la pezo koncentriĝus sur du plandoj kaj estus multe pli granda danĝero, ke li trafalos.

Retenante la spiron, decimetron post decimetro li klopodis venki la plej grandan malhelpaĵon. Li transrampis jam trionon, duonon, tri kvaronojn —jam restis nur peceto—

Ekkrio, svingo per la manoj falo kaj poste nur bruoj de la falanta neĝo

Marcel Payen kuŝis sur la fundo de la krevajo, kies plafonon li ĵus trarompis. En la dekstra piedo ĉe la maleolo li sentis teruran doloron, en la kapo estis sovaĝa turniĝo.

Post mallonga tempo li rekonsciiĝis. Dekstre kaj maldekstre de li kuŝis densa mallumo, kiu nur en iuj lokoj ŝanĝiĝis en duonkrepuskon. Tra la granda truo super li la taglumo penetris en la kavaĵon.

Fluga rigardo konvinkis lin, ke ne estos facile suprengrimpi. La krevajo havis formon de kruĉo. Supre kaj malsupre ĝi estis plej mallarĝa, meze plej larĝa tiel, ke la supraj partoj de la muroj estis tute superpendaj. Kia feliĉo, ke li certigis sin per la ŝnurego !

Li liberigis sin el amaso da malmola neĝo, kiu sur kelkaj lokoj ruĝiĝis per lia sango. Payen ektimis. Ĉu li estas vundita ? Li tuŝis per la mano la vizaĝon—la tuta manplato estis ruĝa. Dank' al Dio ! Ili estas nur supraĵaj difektoj !

Li streĉis la ŝnuregon kaj rigardis la murojn. Li ne sukcesos alie, ol per grimpo rekte supren, sen apogo per la piedoj !

Kelkfoje li forte tiris por konvinkiĝi, ĉu la ŝnurego estas bone fiksita. Poste li saltis kaj volis fari la unuan grimpon.

Sed en la sekvanta momento li alteriĝis kaj ĝemis. Akra doloro en la maleolo faligis lin al la tero. Ĉu ĝi estas rompaĵo ? Ĉu nur elartikiĝo ?

Estu kiel ajn, li devos eksteren. Ĉi tie estas pika frostoj, liaj manoj komencas rigidiĝi—

Denove li kroĉis sin al la ŝnuro kaj metis en la maŝon siajn piedojn. Kaj denove tordiĝis lia vizaĝo pro la doloro kaj li falis.

Bone, li provos tion sen helpo de la piedoj. Li ja ofte grimpis tiamaniere en la gimnastikejo !

Li prenis la ŝnuregon nur per la manoj. La krurojn li lasis libere pendi. Unu, du—kaj sufiĉe. Li restis pendanta kaj ne povis pluen. Li streĉis ĉiujn fortojn kaj progresis ankoraŭ dudek centimetrojn supren. Poste li falis malsupren.

La korpo, malfortigite de la malbonfarto de la lastaj tagoj, de la malsato kaj nova vundiĝo, ĉesis servi.

Marcel Payen paligis. Ĉu tiamaniere devas finiĝi lia sava vojo ?

Iomete li ripozis. Li manĝis la biskviton de la ĝeneralo kaj klopodis varmigi la frostigitajn manojn per la spirado.

Li ĵetis sin sur la ŝnuregon, kunpremis la dentojn kaj flugis supren. Per superhoma klopodo li grimpis preskaŭ ĝis la duono. Tie lin forlasis la fortoj. Li povis fari kion ajn, sed pli alten li ne povis progresi.

Li provis meti la piedojn en maŝon kaj retenigi supre. Iomete li respiros kaj poste—

Doloro akra kiel razilo penetris denove la maleolon. La senpova korpo falegis malsupren . . .

Malvigle li rigardis momenton en la mallumon.

Ĉu la fino ? Kaj kion pri Daumal ? Kaj kion pri la forlasitoj ?

Ne, li ne cedos !

Ree kaj ree li ĵetis sin sur la ŝnuregon. Sensukcese. Li sentis, ke la fortoj lin forlasas, ke li komencas tremi de malvarmo—

(daŭrigota).

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Kopasz. Al Ges-roj D-ro, FD de U.E.A. en Szeged, Hungarujo naskiĝis filino, Rita Maria Magdolna.

Fianĉiĝo

Van Diggelen. F-ino Tine en Hago, Nederlando kun S-ano Oscar **Persson** en Göteborg, Svedlando.

Geedziĝo

Noeske. F-ino Eva kun S-ro Ulrich **Hoffmann** ambaŭ en Berlin-Neukölln, Germanujo, 19-an de Aŭgusto, 1949. Fervoraj kunlaborantoj por nia afero en Berlino.

Al ĉiuj niajn sincerajn gratulojn !

Peto al kongresintoj

Se vi iel povas proponi plibonigojn por la estontaj Universalaj Kongresoj, bonvolu skribi al la konstanta kongresa sekretario, S-ro O. T. Nicolaisen. Krome skribu kion vi ŝatis aŭ malŝatis en la 3 lastaj kongresoj kaj kiel vi farus la aranĝojn. **Nepre atentu la adreson :** S-ro O. T. Nicolaisen, chez Union Espérantiste Française, 34 rue de Chabrol, Paris-10, Francujo.

ENIGMA KONKURSO N-ro 41

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20A, Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 39.

N-ro 83 : Kredito estas la konfido en monaferoj, kiun posedas tiu, kiu ne bezonas ĝin. Ŝlosilvortoj : junularo, paroksismo, konfiski, efemera, tendeno, abstini, zodiako, ĝendarmo, subteni.

N-ro 84 : Ni nomu la subtrahaton PQRSTU, tiam la desubtrahato estas PQRSTUB. Ĉar la sepa desubtrahato havas 7 ciferojn kaj la oka 6, A devas esti 1. El $4 \times PQRSTU + B = 111 \dots 1$ sekvas $P=2$, $Q=7$ kaj B estas nepara. La unua restaĵo $B1 \dots 1 = 9 \times 27RSTU + B$, kaj ĉar tio estas pli ol 243 $\dots$ kaj malpli ol 252 $\dots$ kaj ĉar B estas nepara, B devas esti 5, kaj tiam $U=4$. La oka desubtrahato do finiĝas per 157, kaj $3 \times PQRSTU$ do finiĝas per 152. Se ni dividas $\dots 152$ per 3 ni trovas la lastajn tri ciferojn de la kvociento se oni per 3 dividas 152 eventuale anstataŭata de 1 aŭ 2 (la restaĵo de la lasta divido). Ĉar nur 1152 estas dividebla per 3, la lastaj 3 ciferoj de la subtrahato estas 1152 : $3=384$. El la unua subtraho $27R3845 - 27R384 = 251?461$ nun sekvas, kiam oni forigas ĉiujn superflujajn ciferojn $R3-7R=1?$ aŭ $9 \times R = 77 + ?$ aŭ $R=9$. La subtrahato do estas 279384.

N-ro 85 : akrido, makako, legomo, debeto, akanto, kapelo, telero, nebulo, anteno, kanapo, perono, doloro, balono, kloako, korano, dekano, alkovo, rokoko, karoto.

N-ro 86 : Sperto estas tio, kio postrestas, kiam oni ĉion perdis. Ŝlosilvortoj : simetrio, plastiko, epiteto, redaktoro, taksuso, onikso, endivio, sinagogo, trombono, aeroplano, standardo, timiano, ilaĉo, obligacio, kamomilo, inundi, okupi, parentezo, ostracismo, sardelo, talismano, rapsodio.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 37-a konkurso : S-ro A. Jensen (Dan.) 104 p., S-ro T. K. Slade (Brit.) 103 p., F-ino N. E. Powers (Brit.) 100 p.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 38-a konkurso : S-ro M. Cornet (Ned.) 109 p., S-ro E. Schmitt (Franc.) 108 p., S-ro A. Marmenout (Belg.) 104 p.

Sekvas post ili S-ro S. Roelofsen 102, S-ro A. Stanura 98, S-ro Chr. F. W. Slijper 97, S-ro A. Coutinho 96, S-ro F. Taylor 95, S-ro M. Tauil 92, F-ino A. Reiné 88, S-ro Fr. Kreutzberg 88, S-ro P. Saretto 82, S-ino C. M. E. Den Hollander-Mighorst 81, S-ro A. H. v. d. Broek 81, D-ro W. Manders 79, S-ro D. A. Henskes 79, S-ro L. Staal 78, F-ino E. Jayet 75, F-ino J. J. v. Thiel 75, S-ro J. S. Schooleman 73, S-ro L. G. Livett 72, S-ro P. E. Schwerin 72, S-ro H. Dalier 70, S-ro G. Faraco 70, S-ro A. E. Rosengaard-Hansen 68, S-ro C. Rogister 65, S-ro C. Graversen 65, F-ino B. Bowell 63, S-ro J. Escaré 62, S-ro E. Maynar 62, F-ino A. C. Nilssen 60, S-ro R. Pawlik 60, F-ino N. Hanson 59, F-ino P. C. Sinclair 59, S-ro J. Ekström 59, S-ro W. Rusch 58, S-ro A. de Vries 55, S-ro G. Turin 55, F-ino J. Baird 51, S-ro P. Slechta 51, S-ro L. Anjer 50, S-ro A. Egg 49, S-ro O. Bevan 49, S-ro I. B. de Araujo 48, S-ro Th. Sund 47, S-ro L. Vitali 46, S-ro E. Riedl 45, S-ro A. Csader 45, S-ro J. Soyeur 44, S-ro P. Kustaanheimo 43, S-ro Fr. Couwenberg 43, S-ro A. Frolišek 42, S-ro D. I. Oreb 42.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias tion, mi ripetas, ke ĉiu MA kun la sama ŝanco povas komenci la ensendon de la solvoj je kiu ajn momento. Por ĉiu korekta solvo mi ordinare donas 5 poentojn por havi la eblecon rekompenci ankau ne tute korektajn solvojn per malpli da poentoj. Tiuj poentoj estas enskribitaj en liston, kaj ies poentnombro kreskas se ŝi aŭ li daŭrigas la ensendon. Ĉiufoje la 3 personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas po premion kaj ilia poentnombro estas nuligata. Se ili daŭrigas la ensendon ili komencas denove kun 0

poentoj. Tiu sistemo garantias, ke ĉiu partoprenanto iam gajnos premion ĉar la asigno ne dependas de lotumado. La premioj konsistas el libroj, kiujn la gajnintoj mem rajtas elekti ĝis la sama valoro por ĉiu. Limdato por Eŭropanoj, 2 monatoj ; por aliaj iom pli. Tiu, kiu deziras pliajn informojn, aldonu respondkuponon.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 25.34m. I.
	17.15-17.30	Paris. 31.38m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	19.00-19.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 31.41m. P.
Dimanĉo	23.30-23.35	Budapest Kossuth. 549.5m. I. Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
Lundo	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 19.80m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Mardo	01.15-01.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m.
	07.05-07.20	Paris. 386.8m. K. (Ĉiun duan mardon de 18.X.)
	11.55-12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	14.15-14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.40-17.45	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
Merkredo	20.10-20.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	22.15-	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.45-18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 229.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.40-17.45	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	22.00-22.10	Ostrava. 259m.
	22.00-22.15	Graz 338.6m. I. (nur la unuan ĵaŭdon). Radio Graz, "Esperanto Voĉo" Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
Vendredo	17.15-17.30	Graz (detaloj kiel ĉi-supre sed ĉiuvendrede). K.
	20.50-21.00	Praha. 269m., 325m., 470m. I. Stalinova 12, Praha XII.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Invito—Ni serĉas konstantan kunlaboranton por la fako Radio. Nur fidinda kaj konscienca aŭskultanto anoncu sin al la C.O. en Rickmansworth.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 220.

5-an de Septembro 1949

NOVAJ DELEGITOJ

Angolo

Lobito. D : J. Alves Marques, C.P.211, Lobito, Angola, Port. Okcidenta Afriko.

Aŭstrujo

Klagenfurt. D : K. Dürschmid, Hoffmannngasse 4.

Belgujo

Charleroi. VD : P. Paulus, 60 rue du Grand-Central. Tel : 19517.

FD (Sociaj leĝoj) : La VD.

Britujo

Letchworth. FD (Edukado) : Russell Scott, Wilbury Crest. Tel : 332.

Francujo

Moulins. D : D. Chagnoux, 12 rue Rosa Bonheur, Yzeure (Allier). Tel : Moulins 415.

Yzeure. D : D. Chagnoux, 12 rue Rosa Bonheur. Tel : Moulin 415.

Germanujo

Erlangen. D : A. Starke, Spardorfer Str. 70.

Jugoslavujo

Kočevarje. FD (Aŭtomobiloj) : B. Brezovšek, ĉe GAP, Kočevarje.

Varazdin. FD (Teksindustrio) : M. Blass, Mihanovićeva ul. 10. Tel : 460.

Kanado

Duncan, B.C. D : H. P. Devenish, R.R.1. Tel. 504.L. 3.

Koreo

Seoul. D : D. M. Seok, Nacia Scienca Muzeo, Nam San. Tel : (5)5550 ; 1671.

Nederlando

Amerongen. D : F-ino C. Zorgdrager, Betonweg C 247.

Svedujo

Hjälteby. FD (Abelkulturo) : Gunnar Åsemyr, instruisto.

Sparsör. D : B. Markling, Villa Solhamra. Tel : Borås 60470.

Svislando

Zug. FD (Libro-bindado) : H. Herrmann, Vorstadt 24.

Turkujo

Malatya. D : Ferruh Canatay, Kiğili ap. kat 1. Tel : 70.

ŜANĜOJ

Argentino

Bahia Blanca. D : vakas.

Aŭstrujo

Innsbruck. D kaj FD : vakas.

Belgujo

Gent. D kaj FD (Scienca Literaturo) : nova adreso : 178 Peter Benoitlaan, Merelbeke.

Brazilo

Florianópolis. D kaj FD (Statistiko) : nova adreso : Caixa postal 377.

Petropolis. D : vakas.

Britujo

Blackburn. D : vakas.

Danujo

Valby. D : vakas.

Francujo

Paris. FD (Komerco) : vakas.

Jugoslavujo

Ljubljana. FD (Aŭtomobiloj) : vakas.

Svedujo

Höviksnäs. FD (Abelkulturo) : vakas.

Vasteras. FD (Vegetarismo) : vakas.

Svislando

Lausanne. FD (Libro-bindado : Gimnastiko) : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

355. S-ino M. L. Planck, Kitzbühel, Aŭstrujo.
356. S-ro F. Bastjančić, Karlovac, Jugoslavujo.
357. S-ro M. Katić, Karlovac, Jugoslavujo.
358. S-ro B. Klakočar, Karlovac, Jugoslavujo.
359. S-ro I. D. Oreb, Vela Luka, Jugoslavujo.
360. S-ro J. Vuksinec, Karlovac, Jugoslavujo.
361. S-ro M. Kibort, Jawor, Pollando.

DONACOJ. F-ino E. E. Sutton 5 ŝil.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de Aŭgusto 1949, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	8988	6699
Individuaj membroj :		
MJ	927	766
MA	4394	4247
MS	337	359
Patronoj ..	21	15
DM	171	184
HM	56	59
	5906	5630
	14894	12329

Komitatanoj B. Laŭstatute "La Delegitoj elektas el internacia listo unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vic-Delegitoj kaj Fak-Delegitoj ne partoprenas tiun voĉdonadon." La venonta elekto okazos en printempo 1950.

Ĉiu delegito havas la rajton proponi iun delegiton (sed ne VD aŭ FD) kiel kandidaton, sed la proponito devas havi la subtenon de kvin delegitoj por aperi en la listo.

Kandidato devas antaŭe promesi ke li plenumos la devojn de la ofico, se elektita, kaj ke li ĉeestos la kunsidojn de la komitato en la kongresoj.

Proponojn oni sendu tiel ke ili atingos la oficejon, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, antaŭ la fino de februaro, 1950.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Leteroj de L. L. Zamenhof



La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus
retrovita korespondo kun la francaj
 eminentuloj. Prezento kaj komento de
Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901–1906
388 paĝoj

2a volumo, 1907–1914
374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

NOVA PREZO : ĉiu volumo 21ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam
konigas detalojn de vivo, karaktero kaj
sentimento de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi
libro ne temas nur pri leteroj de la majstro,
sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la
movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon
kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

NONI KAJ MANI

de

Jön Svensson

Tradukis

Paul van den Hövel

Rakonto pri la spertoj de du malgrandaj
Islandaj knaboj, kiuj perdiĝis sur la
vasta maro.

Bele presita sur bonega papero.
160 paĝoj

Broŝ. 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

DIABLET' EN LA BOTEL'

de

Robert Louis Stevenson

Elangligis

Jozefo Seka

48 paĝoj : 1ŝ. 10p. aŭ 7 rpk., afrankite

Eldonita en Germanujo



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA "EPOKO" LIBROJ

Serio de interesaj romanoj por la distra horo

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
108 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
7. **Sep Vangoŝrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.
8. **La Virineto en Bluo** kaj aliaj rakontoj.
Originale verkitaj de Masón Stuttard.
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo